



# ESPERO KATOLIKA

## KOMUNIKOJ PRI „NIA XXV-a” EN AMSTERDAM

(de sabato 31 julio ĝis ĵaŭdo 5 aŭgusto 1954)

1. La unuaj partoprenontoj jam sin anoncis! Sed vi sciu ke la L.K.K. disponas pri ejo kiu povas enhavi + 250 gekongresanojn. Subtenu ĝian laboron per kiel eble plej baldaŭa aliĝo. Tiukaze vi nepre ne forgesu ensendi la aldonitan aliĝilon en „Espero Katolika”, decembro 1953, al la sekretario/kasisto: s-ro G. Ellerman, de Clercqstraat 42, Amsterdam-W (Nederlando), poŝtkonto 462266.

La kongreskotizo sumiĝas: ĝis 1/4-1954: ned. guld. 8,—. Por ĉiu monato pli poste, unu ned. guld. pli. Por blinduloj, junuloj kaj dua, tria k.t.p. samfamiliano oni nur ŝuldas la duonon.

2. „Nia XXV-a” okazos en festsalono de la katolika liceo por knabinoj „Fons Vitae”, Reijnier Vinkeleskade 53, Amsterdam-Z.

Ĝi estas freŝdata konstruaĵo kun aparta kapelo, estrata de la Franciskanaj Fratinoj, kaj situas en facile atingebla kaj moderna urbkvartalo.

3. Jam stabiligis la planoj por la t.n. „arta vespero”. En la provizora programo troviĝas i.a.: prezentado de fragmentoj el „Gijsbreght van Aemstel” de Joost van den Vondel, nia nacia poeto; plie muzikaj bildoj de ’l tipe nederlandaj streĉoj kaj tradicioj.



Por la L.K.K.: A. F. Leideritz.



### ALVOKO AL KURSGVIDANTOJ!

Ni intencas aranĝi t.n. paralelkursojn en la aŭtuno 1954, kiel antaŭe jam faris diverslandaj popoluniversitatoj, por instigi la gekursanojn al korespondado kun alilandanoj samtempe sekvantaj kurson. Instigojn kaj proponojn vi sendu jam nun al la redakcio de E.K., por ke ni povu preparoli la temon kaj fiksi la programon dum nia XXVa en Amsterdam.



## LA MEDICINA HISTORIO DE LOURDES — II.

Vi konas, resume, la vivon de Sankta Bernadette, la konfidenculino de la Senmakula Virgulino? Vi konas la religian rakonton pri la Groto de Lourdes? Vi aŭdis, — pli aŭ malpli, kaj pli aŭ malpli bone, — pri la Resaniĝoj subite venintaj en Lourdes?

Probable, vi nescias la „rolon” de la kuracistoj kiuj prenas sur sin, ĉe Lourdes, funkcion tre specialan pri tiuj resaniĝoj? Mi estas komprenigonta al vi tiun rolon de la Kuracistoj. Tio estos la ĉapitro de „Medicina-Lourdes”, en kiu precizaj informoj estos prezentataj al vi, koncernantaj:

1. la Kuracistojn nomitajn „Kuracistoj de Lourdes”;
2. la Malsanulojn, kaj la Faktojn de Resaniĝo;
3. la Resaniĝojn nomitajn „Mirakloj”, aŭ „Miraklaj Faktoj”;
4. la Agmanieron de la Medicina Korporacio pri la FAKTO de LOURDES.

1. La unua kuracisto kiu estis atestanto de la resaniĝoj, antaŭ la Groto, en 1858, estis D-ro **Dozous**, kiu praktikis medicinon en Lourdes. D-ro Dozous estis proksime de Bernadette, antaŭ la Groto, dum kelke da „Aperoj” de la Sankta Virgulino, menciinde ĉa la miraklo de la kandelego: Bernadette, ekstaziĝante, metis la manon sur la flamo de la kandelego kiun ŝi tenis per la alia mano, kaj tio dum kvaronhoro — D-ro Dozous kalkulis la minutojn per sia poŝhorloĝo; la mano de Bernadette ne estis bruligita; sed, post la ekstazo, D-ro Dozous prenis la kandelegon kaj metis la flamon sub la sama mano... kaj Bernadette vigle retiris sian manon dirante: „Vi min bruligas”. D-ro D. estis malkredulo. Kelkaj el liaj klientoj, tre malsanaj eĉ neresaniĝeblaj, mortantaj, resaniĝis. La atesto de tiu kuracisto, sciencoplena, tute honesta, estas la atesto de Okulvidinto... Nu, inter la kvar kuracistoj de Lourdes, sola D-ro D. estis nekredema, kaj estis li kiu observis, tre atente, Bernadette. Ni tie admiru la saĝon de Dio, kiu ebligis al kuracisto, malkredulo, esti okulvidanto de la unuaj Faktoj de Lourdes!

Kelkaj kuracistoj, mirigitaj kaj sciencamaj, tie ĉi kaj tie en Francujo, studis la strangajn faktojn de Lourdes.

En la jaro 1882 la **Oficejo de la Konstatoj** estis kreata de D-ro **Dunot de Saint Maclou**, kiu estis la unua Prezidanto; li observis la Faktojn, li skribis, skrupule, la rakonton de la resaniĝoj.

En 1892 D-ro **Boissarie**, kiu jam estis konstanta asistanto de D-ro Dunot de Saint Maclou de post ses jaroj, postsekvis lin. Li impulsis la sciancan studadon de la Faktoj, kies atestanto li estis dum 25 jaroj de prezidanteco. Poste la prezidantoj estis: D-ro **Le Bec** (1918-21); D-ro **Marchand** (1922-25); D-ro **Vallet** (1926-46), kaj la aktuala Prezidanto D-ro **Leuret** (de post 1947). Dank’ al ili, la **Oficejo de la Konstatoj** fariĝis, iom post iom, nia aktuala **Oficejo de la Sciencaj Studoj**, kiu estas konata kaj grandvalore taksata de multaj kuracistoj de Tutmondo.

Tiuj kuracistoj-prezidantoj kaj iliaj kunfratoj, kiuj donis al la Oficejo de la Konstatoj sian sperton, sian sciencan, sian bonan intencon, sian tempon — senpage — fondis „regularon” pri la funkciado scienca de tiu Oficejo.

D-ro Paul Léger. (Daŭrigota)



**Ni atentigas pri nova librolisto sur la kovrilo!  
La antaŭa enhavante aliajn titolojn ankoraŭ validas.**

## LA SANKTEJO ĈE L' PORDEGO ŜTONA.

Emblemo de la 38-a U.K. de Esperanto, kiu okazis en Zagreb 25. VII-1.VIII.1953, konsistis el pentrinda konstruaĵo en Zagreb, nomata Pordego Ŝtona. Tra tiu pordego oni pasas, kiam oni venas el la supra urbo al la malsupra, kaj inverse. La partoprenintoj de la Kongreso povis ĝin admiri kaj la legantoj de la esper. gazetoj povis vidi ĝian fotografaĵon.

Tiu konstruaĵo estas mirinda el arta vidpunkto. Sed pli mirinda kaj pli fama ĝi estas el religia vidpunkto. Neniu gazeto tamen menciis, ke en la trairejo de tiu konstruaĵo situas kapeleto kun la Gracbildo de la Dipatrino, nomata Dipatrino ĉe l'Pordego Ŝtona.

La 31-an de Majo 1731 terura brulego detruis preskaŭ la tutan superan urbon, kaj ankaŭ grandparte la suban urbon Zagreb. En tiu konstruaĵo, kie estis la bildo, la tuta meblaro cindriĝis, nur tiu bildo, pentrita sur tolo, troviĝis netuŝita de fajro. Tiam oni komencis aparte honori ĝin, antaŭ ĝi preĝi, kaj alvoki la Dipatrinon en siaj materiaj kaj spiritaj bezonoj. Multaj danktabuletoj, bildoj, juveloj, kaj aliaj piaj objektoj atestas pri diaj favoroj kaj gracoj, atingitaj pere de la Dipatrino ĉe l' Pordego Ŝtona. La tutan tagon brulas antaŭ ĝi pluraj kandeloj. Sennombraj preterpasantoj preskaŭ senescepte haltas antaŭ ĝi por preĝi, aŭ almenaŭ por saluti la Dipatrinon.

La 31-an de Majo 1931 oni solene celebris la duan jarcenton de la mirakla konservo de la Gracbildo en la brulego. Tiuokaze la Gracbildo estis kronita per la ora krono, enhavanta multajn juvelojn, inter kiuj estis unu granda smeraldo de la tiama reĝino jugoslava Maria Karadjordjeviĉ.

Bildetoj de la Dipatrino ĉe l' Pordego Ŝtona surhavas belan poemon, kiu esperantlingve tekstas:

Dipatrino ĉe l' Pordego Ŝtona,  
Nin rigardu via okul' bona!  
Vi modelo estas de l' ĉielo,  
Vi sopiro nia, kaj korcelo.  
Ni, espero nia, petas vin:  
Ho aŭskulto, kaj elaŭdu nin!

Ho, Patrino, kiu arde petas,  
Ni sanigon de vi tuj elpetas;  
Kiam homoj helpi plu ne povas,  
Ni la savon certe ĉe vi trovas.  
Tial nia vin alvokas kor':  
En ĉi tiu savu nin vi hor'!

Suprenlevu nin ĝis trono Dia,  
Kaj lumigu nin la lumo Lia;  
Ekbruligu ĉiujn arda flamo  
De la sankta Dia, frata amo!  
Vi ornamo de la Dia tron',  
Kaj plej bela estas Lia don'.

P. A. CRNICA, OFM.



### I.K.I. III.

„Nun kiam mi legis vian libron: „Kie estas la Eklezio de Kristo?” mi hontas pro la kalumnio kaj la absurdaĵoj rilate la katolikan Eklezion, kiuj troviĝas en la lernolibroj de niaj lernantoj. Mi zorgos ke, ek de nun, ili estos pli bone informataj!” Tiel foje skribis lernejestro el Danujo. Post paso de unu jaro li petis multe preĝi por li; tiutempe li estis jam tiel progresinta, ke li estis pendiginta grandan pretraĵon de Nia Sinjorino en sian lernejon, kaj ĉiutage, kun siaj lernantoj, preĝis la Ave Maria'n.

Li ne estas la ununura. Povas esti, ke post jaroj de serĉado, pristudado kaj korespondado ili venos al la vera Religio, kiel i.a. okazis al informpetintino, ankaŭ el Danujo, kiu tuj antaŭ la milito petis informojn kaj en Aprilo 1947 sciigis al I.K.I. ke, dank' al tiuj informoj, ŝi komencis plue serĉi, kun la sekvo ke ŝi katalikiĝis en 1945.

Multaj centoj da informpetoj jam atingis IKI'n, jam pli ol 2000, el 63 landoj. Multaj nekatolikoj jam trovis, pere de IKI, la Veron. Kiom multaj, ni ne scias, nur Dio scias. Ankaŭ nur Dio scias, kiel grandega la laboro estas, farata de I.K.I. Donu vian subtenon, vi ĉiuj Esperantistoj katolikaj de la tuta mondo: IKI bezonas ĝin, kaj mem ne posedas la rimedojn por financi la elspezojn. Subtenu vian IKI'n, kiel Dio subtenas la laboron de IKI. Videble Li faras tion, ĉar kiam ni fervoras Lian Honoron, tiam Dio benos nian laboron!

E.H.



### SURDMUTULO FARIĜOS SACERDOTO.

Juna surdmutulo el Brazilo: Vincento de Paul Benido Burnier, sukcesis post obstina penado, trapasi la tutan studprogramon de la seminario. Unue en la malgranda seminario en la eparkio Juiz de Flora, lia loĝloko, en la ŝtato Minas Gerais; poste en la ĉef episkopa seminario de Mariana. Li nun estas 29-jara; en decembro 1947 li finis la teologion kaj de post tiam li laboras en la diocezo, dum ke li atendas respondon de la Kongregacio de la Sakramentoj. Por lia kazo oni devis demandi permeson en Romo por ricevi la necesajn eksterregulajn permesojn. La Kongregacio de la Sakramentoj studas tiun kazon kaj diversaj ekleziuloj el Romo opinias ke la respondo estos favora. Cetere jam en 1919a la Kongregacio akordis similan permeson por franca religiulo, Pastra moŝto Jean-Marie la Fonta, Asoptionsisto, kiu dum 6 jaroj ekzercadis fruktodonan apostolaton inter la surdmutuloj. La historio kiun skribis lia profesoro estas titolita: „Surdmutulo fariĝis pastro.” (Presejo de la orfoj rue de la Fontaine, 40 Parizo 1930). La seminaristo Vincento de Paul Benido Burnier petas ĉiujn surdmutulojn kaj ĉiujn interesitojn, ke ili bonvolu preĝi kaj peti preĝojn por ricevi la gravan kaj de li tiom deziritan permeson. Li deziras kontakti kun la institucioj por surdmutuloj kaj interŝanĝi instruplanojn kaj labormetodojn ĉe surdmutuloj. Li komprenas la lingvojn: Portugala, Latina, Franca, Hispana. (Vi certe ankaŭ povas skribi esp. lingve!)

Lia adreso estas: Vincente de Paulo Benido Burnier, Avenida Rio Branco, 2644, Luez de Fora. Estado de Minas Gerais. **Brazilo.**

El la Tradukis: Frato Arni Decorte.



**Deziras korespondi** germana junulargvidanto, 31-jara, esperantlingve kun Indiano. Adr.: K.A.-Korrespondenzdienst, (13a) Schwandorf in Bayern, Postfach, Germanujo.



## AMSTERDAM, KONGRESLOKO DE NIA XXVa.

„Locus sacer”, „Loko sankta” nomiĝas en Amsterdam la tereno, kie oni konstruis en 1347-a kapelon memore de tie okazinta miraklo kaj de la komenco ĝi fariĝis por multaj pilgrimejo honorinda.

En libreto de la paroĥestro MARIUS, presita en 1639-a, ni legas i.a. ke en la jaro 1345-a malsanulo komuniĝis por, laŭ kristana kutimo, prepari sin por la morto. Pro subita pligraviĝo de la malsano li tamen elvomis la Hostion. La virinoj kiuj lin flegis, ĵetis la elvomitaĵon en la fajron sed ne kontrolis ĉu eble restaĵo de la konsumita Hostio troviĝas en ĝi.

La sekvantan matenon unu el la virinoj malkovris meze de la flamoj blankan kaj kompletan Hostion, la saman kiun ŝi antaŭe vidis en la manoj de la sacerdoto.

Ĉiuj pastroj de la urbo nun estis kunvokataj. Ili venis kun krucoj, kandeloj kaj standardoj al la loko, kie la Hostio estis trovita kaj ili reportis ĝin procesie kaj kun granda honoro al la paroĥa preĝejo.

La supre menciita kapelo ne plu ekzistas. Pro kadukiĝo bedaŭrinda, oni ĝin malkonstruis en 1908-a.

Sed ĉiujare, je tri sinsekvaj dimanĉoj en marto, la katolika enloĝantaro nederlanda pilgrimas dumnokte al la „Loko sankta” en Amsterdam. Senbrue kaj devote, arde preĝante....

Ĉi tiu procesio silenta estas viva atesto pri nia neŝancebla kredo je la sankta Eŭkaristio.



*Postquam Pastor inaudivit  
Rem stupendam, mox adivit  
Domum; cum frequentia*

*Omnis Cleri, deportatur  
Panis vivus, et ornatur  
Digna reverentia. f. 60.*

Traduko de la latina teksto sub la gravuraĵo: Kiam la pastro aŭdis la mirindan fakton, li baldaŭ direktis sin al la domo; en pompa procesio de la tuta klerikaro oni transportas la vivan Panon kaj oni solenas ĝin kun la ŝuldata respekto.

A.F. Leideritz.

## LA KVARCENTA DATREVENO DE LA FONDO DE „GREGORIANA UNIVERSITATO”.

Okaze de tiu jubileo la Papo sendis leteron al la Rektoro, la jezuita patro Adellan. La dokumento estas alta rekono de la sankta Seĝo pro la nemezurebla laboro de tiu Universitato en la servo de la Sankta Eklezio kaj de la homaro. Al la universaleco de la studoj korespondas la universaleco de la lernantoj, kiuj venas el ĉiuj partoj de la mondo al Romo por tie atingi veran formacion ĉe la Gregoriana Universitato. Kvardek kolegioj de sekularaj pastroj kaj okdek religiaj ordenoj kaj kongregacioj el malsamaj nacioj sendas siajn disciplojn al la „Gregoriana”.

„Tio — diras la Sankta Patro — estas viva kadro” de la unueco kaj universaleco de la katolika Eklezio „kaj tutplene pravigas la vortojn de Gregorio XIII, de kiu la Universitato prenas nomon: Kolegio de ĉiuj Nacioj”.

Patra invito finas la leteron: la Papo spronas profesorojn kaj disciplojn de la „Alma Mater” ĉiam daŭrigi laŭ tiu glora vojo, stimulante la universecon de la studoj kaj zorgante en la disciploj la unuecon de la doktrino kaj de la karito, ekbruligante en la animoj la fajron de la apostola fervoro.

El la Vatikana Urbo la 16an de oktobro 1953.

(el itala esper. **Aler**).



### NOMOJ DE SANKTULOJ EN ESPERANTO. II.

5. La esperantigo de la plej multaj propraj nomoj indikitaj sub nroj. 1 kaj 2 estas tiel facila pro tio, ke oni trovas en la latinaj nomoj la akcenton sur la silabo antaŭ la finaĵo. Tiu akcento do senŝanĝe transiras de la latina radiko al la esperanta radiko. La esperantigo simple konsistas en la ŝanĝo de la finaĵo kaj de ortografio.

Ekzistas en tiu grupo kelkaj nomoj, en kiuj la akcentita silabo finiĝas je vokalo: Bartholomaé-us, Bartolome-o. Matthaé-us, Mate-o.

Kaj ni vidas, ke la akcentita vokalo estas konservata en la esperanta nomo.

Al tiu ĉi grupo do ankaŭ apartenas: Basilí-us Basili-o.

6. Oni povas al si demandi, ĉu la derivado de la esperantaj nomoj el latinaj formoj validas laŭ lingva vidpunkto. La salto ja estas tre granda: staras multaj jarcentoj inter la periodo de la latina lingvo kaj la nuna tempo de Esperanto.

Se Esperanto estas esprimilo moderna de la internacia vivo, kiel la latina lingvo estis en antikva tempo, ĝi estu simpliĝo de tiu lasta laŭ veraj lingvaj leĝoj.

Kvazaŭ pontoj inter tiuj du nun ekzistas la eŭropaj lingvoj, kiuj posedas la samajn proprajn nomojn. Ili ofte montras simpligan tendencon, kiu modernigas la latinan formon kaj proksimigas ĝin al Esperanto:

Anton-ius, Antoine (franca), Anton (germana), Antoon (nederlanda) - Anton-o  
Athanas-ius, Athanase(franca) - Atanas-o Euseb-ius, Eusèbe(franca) - Eŭseb-o  
Gregor-ius, Gregor (germana) - Gregor-o Tarcis-ius, Tarcise(franca) - Tarcis-o  
Bonifa-tius, Boniface(franca) - Bonifa-co Igna-tius, Ignace(franca) - Igna-co  
Lauren-tius, Laurent(franca) Lorenzo(itala) Lawrence(angla) - Laŭren-co  
Mauri-tius, Maurice(franca) Moritz(germana) Maurits(nederlanda) - Maŭri-co

Oni facile povas trovi aliajn ekzemplojn, kiuj konfirmas nian derivon, kvankam la naciaj lingvoj ankaŭ en multaj kazoj ne montras tian regulecon.

Niaj esperantaj nomoj do montriĝas naturaj laŭ vidpunkto de lingva evoluo kaj en dubaj kazoj ni povas kompari la latinan formon kun la nunaj lingvaj formoj por trovi taŭgan esperantan nomon.

(Daŭrigota)

H. G. WANNEMAKERS S.J.

## ESPERANTO VIVAS.

La francaj gazetoj publikigis ke s-ro Lefranc, deputito de Pas-de-Calais, kaj nombro de ties kolegoj deponis ĉe la Oficejo de la Nacia Kunsido projekton favore de la instruado de Esperanto en la publikaj lernejoj. La franca Esp. Ligo petas siajn amikojn klopodi ĉe la deputitoj de siaj distriktoj ke ili subtenu la proponon.

\*\*\*

La XIVa Intern. Kongreso de eks-studentoj de Supera Komerca Instruado okazos en Lyon, Francujo, de 26.6-4.7.54 kaj celas organizi la kunlaboradon sur praktikaj fundamentoj. Pli ol ducent Asocioj el la tuta mondo sendos delegitojn. Estas tre dezirinde ke multaj Esp. eks-studentoj partoprenu. Skribu al s-ro Richard Levin, 34 rue de la Charité, Lyon, indikante nomon de via Sup. Komerca Lernejo, datojn de studado, specon de diplomo kaj ties daton.

\*\*\*

Bonkonata franca Fabriko de Armiloj kaj Bicikloj havas diversajn eminentajn esperantistojn inter sia personaro. La Entrepreno eldonas ĉiujare grandan, riĉe ilustr., kilogramon pezantan katalogon en 5 lingvoj inter kiuj Esperanto. Skribu esp. lingve al: Manufrance, Saint-Etienne (Loire), Francujo por senpage ricevi ekz. sed aldonu 4 resp. kup. aŭ 75 fr. frankojn por la afrankkosto.

\*\*\*

Dum Kunsido de la Ĝeneralaj Ŝtatoj de la Komunumoj de Eŭropo en Versailles la 17.10.53 angla deputito faris proponon favore de „Dulingvismo”: Ĉiuj Francoj lernu anglan, ĉiuj Angloj francan lingvon, aliaj nacioj ambaŭ! Nia franca s-ano Jean Baylac, prez. de la grupo de Marmande, parolis favore de neŭtrala lingvo, post kio la Ĝeneralaj Ŝtatoj unuanime voĉdonis proponon por pristudi dum speciala kunveno de la Konsilantaro de Eŭropoj Komunumoj la problemon de komuna lingvo. Ni dankas kaj gratulas s-ron Baylac kaj la Grupon de Marmande.

\*\*\*

## KATOLIKA EKSTERLANDA KOESPONDSEKSERVO.

La katolika eksterlanda korespondservo (Katholischer Auslandskorrespondenzdienst) peras la korespondadon inter katolikoj el diversaj landoj, ankaŭ inter nekatolikoj kaj katolikoj, precipe inter sacerdotoj, geinstruistoj, gestudentoj, gimnazianoj kaj aliaj gestudentoj.

La k.e. korespondservo celas vekti la misian intereson, precipe ĉe la studanta gejunularo. Ĝi volas fortigi la sociemon de la katolikoj, antaŭ ĉio en landoj nekatolikaj. Ĝi volas interesigi la katolikojn pri la agado de la Eklezio en aliaj landoj, kaj doni al la nekatolikoj la eblecon, letere aŭ persone konatiĝi kun sacerdotoj aŭ eminentaj laikoj. Ĝi volas gvidi la katolikajn instruistojn, studentojn kaj lernantojn al la katolikaj presaĵoj de fremdaj landoj. Ĝi volas ankaŭ servi al ĉiuspeca scienca intereso kaj havigi al katolikaj scienculoj kaj verkistoj eksterlandan literaturon. Ĝi volas ebenigi la vojon al la pensinterŝanĝo de pastroj kaj katolikaj edukistoj el diversaj landoj. Fine, sed certe ne malplej grave, estu tasko de la katolika eksterlanda korespondservo, instigi la katolikojn kiel membrojn de l'eklezio universala, lerni fremdajn lingvojn, ankaŭ la mondlingvon „Esperanto”, kaj akceli ĉe pastroj kaj teologiaj aspirantoj la uzadon de la lingvo latina.

Interesuloj estas petataj, sendi siajn alskribojn kun reafranko kaj informoj pri aĝo, religio, profesio, lingvokonoj kaj deziroj al

„KA - Korrespondenzdienst (13a) Schwandorf in Bayern, Postfach Germanujo”





## RECENZOJ

**Dek ses modernaj svedaj verkistoj:** *Sveda Novelaro*, trad. F. Szilágyi. Eld. Sveda Lab. Esp. Asoc. Stockholm. 235 pĝ. Bindita f 4,50. La 20 noveloj temas pri div. plej ofte dramaj okazintaĵoj en malriĉaj medioj. Stilo kaj lingvo bonegaj. Bela papero, klara preso. Ni rekomendas al plenkreskuloj. T.D.

\*\*\*

**Ferenc Szilágyi:** *Inter Sudo kaj Nordo*. Eld. Soc. Esp. Stockholm. 185 pĝ. Bind. f 6,—. La eminenta hungara aŭtoro, de post kelkaj jaroj loĝanta en Svedujo, rakontas pri ambaŭ popoloj. La ok noveloj varias de tre spritaj ĝis ekstreme dramaj. Certe superflue rimarki ke lingvo kaj stilo estas eminentaj, dum la nomo de la eldonejo garantias bonegan aspekton. T.D.

\*\*\*

**Georges Duhamel:** *Rakontoj pri Nederlando*, trad. kaj eldonis: Roland Dupuis, Stockholm 1938. 60 pĝ. f 1,75. Ankoraŭ tre aktuala. La konata aŭtoro pasigis 3 jarojn en Nederlando kaj trafe priskribas kutimojn kaj morojn de la popolo. La bonega traduko aperis sur bela glata papero sur kiu la 50 fotoj estas tre brilaj, dum la arta presmaniero fariĝas veran juvelon el la havinda libro. Ni rekomendas ne nur al eksterlandanoj intencantaj kongresi en Nederlando, sed eĉ por enlandanoj estas tre interese vidi sian patrujon tra la okulvitroj de eminenta franca aŭtoro.

\*\*\*

**P. Stojan.** *Deveno kaj vivo de la lingvo Esperanto*. Eld. Flandra Esp. Inst. Prezo f 2,25. Tiu ĉi libro estas al ni anoncita, sed ni ĝis nun ne ricevis recenzekzempleron.

\*\*\*

**Evangelia Kantaro.** Eldonaĵo de Kristliga Esperanto.förbundet, Örebro, Svedujo. 1952. 80 pĝ. pr.: sv. kr. 2,50 + afr. Belaspekta libreto en kiu 50 kantoj kun muziko kaj tabelo kun informoj pri verkintoj, tradukintoj kaj komponistoj. La kantoj troviĝas en grupoj: Laŭdo al Dio, la gloro de Dio en Kristo, Preĝo-kantoj. La Kristana Laboro ktp. Ili estas precipe tradukitaj el angla, germana kaj sveda lingvoj, en bona Esperanto. Por la protestanta Esperantistaro certe valora novaĵo. Mire ni vidas inter tiuj kantoj „La Espero” de Zamenhof!

H.G.W.

\*\*\*

**Amo-No-Kuseĵu.** *La Sepa Kandelingo*, trad. Kotohiko Macubara. (2) Bibl. de Tenso-Kôkjô. 15 pĝ. Pr. 2 r.k. Tiu ĉi libreto enhavas similajn pensojn kiel nro. 1 de la serio. La virkinto akceptas kelkajn vortojn de Jesu Kristo, sed bedaŭrinde ne la tutan Kriston. Pro tio li pretendas lumigi la homaron, sed nur donas konfuzon. Ekz. egale la instruo de Jesuo kaj tiu de Budao predikas la veron kaj tio „per la lumo de la intelekto” (p.9). Ni bedaŭras ke ni ne povas rekomendi tiun ĉi libreton. H.G.W.